

# Informilo por Interlingvistoj

7-a jaro (tria serio) ISSN 1385-2191 n-ro 26 (3/1998)

Eldonata de Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo  
(UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL- 3015 BJ Rotterdam, Nederlando)

Redaktoro: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin; tel. +49-30-5412633; fax +49-30-5456742; e-mail:  
[blanke.gil@berlin.snafu.de](mailto:blanke.gil@berlin.snafu.de)

---

## Enhavo

### 1 Jubileo de Eugen Wüster (1898-1977) 2

- 1.1 Centjarigxo de la naskigxo de grava esperantologo kaj fondinto de la terminologio-scienco 2
- 1.2 Konferenco ProCom 98 honore al Eugen Wüster en Vieno 4
- 1.3 La enhavo de la jubilea libro pri Wüster 7
- 1.4 Resumo de la kontribuo de Blanke en la jubilea libro 8

### 2 Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL) 8

- 2.1 Koncize pri la agado de GIL 8
- 2.2 Interlinguistische Informationen (IntI) 9
- 2.3 La jarkonferencoj de GIL 10
- 2.4 La Kromkajeroj de IntI 10
  - 2.4.1 Kromkajero 1: Translation in Plansprachen 10
  - 2.4.2 Kromkajero 2: Terminologiewissenschaftliche Aspekte 12
- 2.5 Membro-Cirkulero 12
- 2.6 Kontaktado kun lingvistikaj kaj alifakaj medioj 13
- 2.7 GIL - cxu instigo por aliaj ? 13
- 2.8 Pri la enhavo de Kromkajero 3: Eine Sprache für die Wissenschaft 14
  - 2.8.1 Enhavtabelo 14
  - 2.8.2 Das Interlinguistik-Kolloquium für Wilhelm Ostwald: Einführung - Enkonduko - Introduko (Ido) (Fritz Wollenberg) 16
- 2.9 La 7-a jarkonferenco de GIL 20

---

*IpI informas pri interlingvistikaj aktivecoj kaj publicajxoj, inkluzive lingvo-politikaj. La redaktoro nur mencias materialojn, kiujn li ricevis en la originalo au kiel kopion. La bulteno estas bibliografie orientita, tamen ankaŭ publikigas recenzojn, raportojn kaj aliajn materialojn.*

---

## 1 Jubileo de Eugen Wüster (1898-1977)

### 1.1 Centjarigxo de la naskigxo de grava esperantologo kaj fondinto de la terminologio-scienco

Eugen Wüster naskigxis antaŭ 100 jaroj (3.10.1898). Li estas la fondinto de la terminologio-scienco (per sia libro Wüster 1931) kaj krome metis la organizan bazon por altkvalita internacia kunordigado de terminologiaj aktivecoj per la internacia informcentro pri terminologio Infoterm (en Vieno). Samtempe li estis unu el la plej elstaraj interlingvistoj kaj esperantologoj (superrigardon vidu cxe Blanke 1996). Li enkondukis la terminojn "esperantologio/esperantologo" kaj "planlingvo" (germane "Plansprache") kaj verkis multajn cxi-temajn studojn (parte kolektitaj en Wüster 1978). Lia "Enciklopedia Vortaro Esperanto-germana", lau sia tipo gxis hodiaŭ nesuperita rilate al scienca precizeco, leksikografia prinotado kaj amplekso (pri tio kp. Blanke 1998a), nur aperis presita de la litero A gxis "korno" (Wüster 1923-29). La dua nur manuskriptforma parto, gxis nun nepresita, intertempe aperis mikrofilme (Wüster 1994) kun ampleksa enkonduko de Blanke (1994). ambaŭ partoj estas acxetebblaj en la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno. Se komplete eldonita la vortarego enhavus cx. 80 000

artikolvortojn kun germanaj ekvivalentoj (tion jam dum la dudekaj jaroj !!). Wüster fondis la terminologio-sciencan subforta influo de Esperanto (kp. W.Blanke 1989; D. BLANKE 1998), kio estas rekonata plii kaj pli. Li ankaŭ okupigxis pri aliaj planlingvoj, ekde meze de la 30-aj jaroj aparte pri Occidental-Interlingue kaj, kunlaborinto de International Auxiliary Language Association (IALA) poste ankaŭ pri Interlingua, laŭ kies influoj li pluevoluigis la projekton pri Terminologia Kodo (sxlosilo) kiel bazon por formado de fakvortoj, enigebla en etnolingvojn kaj ankaŭ en Esperanton. Liaj ampleksaj interlingvistikaj verkoj kaj konceptoj ankoraŭ ne estas sufiĉe esploritaj kaj priskribitaj.

## Literatur

(Titoloj menciitaj en la teksto kaj aliaj materialoj pri Wüster)

BLANKE, Detlev (1979): Wüster kaj Esperanto. Sciencisto antaŭ movadano. En: Esperanto, 72, n-ro 2, p. 27-29

\_\_\_\_\_ (1994): Eugen Wüster, la planlingvoj kaj la Enciklopedia Vortaro. Enkonduko al la filmigita manuskripto de la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana de Eugen Wüster, dua parto korno-Z. (En Wüster 1994)

\_\_\_\_\_ (1995): La Enciklopedia Vortaro de Eugen Wüster. En: CHRDL, Petr(1995, Red.): La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto. Dobrichovice (Praha): KAVA-PECH, p. 41-56

\_\_\_\_\_ (1996a): Novajxo pri la Enciklopedia Vortaro Esperanta-Germana. Aperis la dua parto. En: Scienca Revuo. 47, n-ro 1(168), p. 37-41

\_\_\_\_\_ (1996b): Eugen Wüster: La Enciklopedia Vortaro. En: Esperanto aktuell, 15, n-ro 2, p. 9

\_\_\_\_\_ (1996c): Dua parto de la Enciklopedia Vortaro alirebla. En: Informilo por Interlingvistoj (Rotterdam), 5 (Tria serio), N-ro 1(16), P. 11-13

\_\_\_\_\_ (1997): Zur Plansprache Esperanto und zur Esperantologie im Werk von Eugen Wüster. En: EICHNER, Heiner/ERNST, Peter/ KATSIKAS, Sergios(1997, Eld.): Sprachnormung und Sprachplanung. Festschrift für Otto Back zum 70. Geburtstag. Wien: Edition Praesens, 2. Verbesserte Auflage (dua plibonigita eldono), p. 311-329

\_\_\_\_\_ (1998a): La Enciklopedia Vortaro de Eugen Wüster. En: Literatura Foiro, 29, n-ro 171 (februaro), P. 21-31

\_\_\_\_\_ (1998b): Terminology Science and Planned Language. En: OESER, Erhard/GALINSKI, Christian (1998, Eld.): Eugen Wüster (1898-1977). Leben und Werk - Ein Österreichischer Pionier der Informationsgesellschaft. His Life and Work - An Austrian Pioneer of the Information Society. Wien: TermNet, p. 133-168

BLANKE, Wera (1989): Terminological Standardization - its Roots and Fruits in Planned Languages. En: SCHUBERT, Klaus (1989, ed.): Interlinguistics. Aspects of the Science of Planned Language. Berlin-New York: Mouton de Gruyter, p. 277-292.

\_\_\_\_\_ (1997): Über den Beitrag von Interlinguisten zur Organisation internationaler Terminologiearbeit. En: BECKER, Ulrich (1997, Red.): Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Beiträge gehalten auf der 6. Jahrestagung der Gesellschaft für Interlinguistik e.V., 15.-17. November 1996 in Berlin. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2, p. 4-12

BLANKE, Wera/BLANKE, Detlev (1998): Zum Gedenken an Eugen Wüster, Begründer der Terminologiewissenschaft und bedeutender Esperantologe. Omagxe al Eugen Wüster, fondinto de la terminologio-scienco kaj elstara esperantologo. En: Kongressbuch des 76. Deutschen Esperanto-Kongresses. 29. Mai 1. Juni, Freital/Dresden, p. 30

DELCOURT, Marcel/AMOUROUX, Jean (1978): Wüster kaj Drezen. En: Esperanto, 71, n-ro 11, p. 197-198

HAUPENTHAL, Reinhard (1974): Eugen Wüster 75-jara. En: Monata Cirkulero de Kultura Centro Esperantista, n-ro 57 (majo), p.1-3

PLEHN, Hans-Joachim (1985): Biografio de duona vortaro au Kial Esperantujo perdis sian gvidantan esperantologon. Saarbrücken: Iltis, 16 p.

\_\_\_\_\_ (1981): Infoterm la lasta kreaĵo de prof-ro Wüster. En: BEDNARIK, Ales (1981, Red.): Apliko de komputiloj. AEST '81, Vol. 1, Poprad: Zvaz esperantistov v SSR/Asocio de Esperantistoj SSR,, p.21-26

VETTER, Rob (1978): La alia flanko de la medalo. En: Esperanto, 71, n-ro 3, p. 44-46

Wüster, Eugen (1978): Esperantologiaj studoj. Memor-Kolekto. Editorita de Reinhard Haupenthal. Antwerpen- La Laguna: Stafeto/T. Kehlet, ISBN 90 6336 005 3, 254 p.

\_\_\_\_\_ (1994): Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana. Korno-Z (Enzyklopädisches Wörterbuch Esperanto-Deutsch. Korno-Z. Manuskript/Manuskripto. Mit einer Einführung von Detlev Blanke/Kun enkonduko de Detlev Blanke. Darin auerdem/krome entenas: PLEHN, Hans-Joachim.: Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana. Korno-L. Abschrift des Manuskripts von Eugen Wüster/Tajpkopio de la manuskripto de Eugen Wüster. Mikrofilm. Wien: Österreichische Nationalbibliothek/IEMW, 2161 filmigitaj pagxoj)

## 1.2 Konferenco "ProCom '98" honore al Eugen Wüster en Vieno

Almenau unu (kaj ne la sola) rezulto de Terminologia Esperanto-Centro de UEA (TEC) estas, ke meze de la 80-aj jaroj ligigxis fruktodonaj rilatoj inter UEA kaj terminologi-sciencaj/organizaj medioj, kiuj daŭre plifortigxis. Tiuj rilatojn establis aparte Wera Blanke kaj daŭre flegis ilin, interalie per kelkaj esplorrestadoj (kune kun D. Blanke) cxe Infoterm (pri la interlingvistika heredajxo de Wüster). Aperis kelkaj publicajxoj. Do, en terminologi-sciencaj rondoj kreskis la konscio pri la graveco de la planlingva influo al la verko de Wüster. Pro tio, versxajne la unuan fojon en sia historio, Esperanto estis bone reprezentita kaj gxiaj fakuloj ludis aktivan kaj plene akceptitan rolon en prestigxa internacia konferenco en la medio de terminologio-scienco. Inter la 120 partoprenantoj el 26 landoj estis multaj internacie renomaj terminologio-sciencistoj, bone konataj el la nacilingva fakliteraturo.

Sub la kadra temo "Faka komunikado kaj scio-transdono - ProCom '98" de 24.-26.8.1998 en Vieno okazis "duobla konferenco", organizita omagxe al Eugen Wüster (3.10.1898-29.3.1977) okaze de la Centjarigxo de lia naskigxo. Temas pri

a) la scienca konferenco "Profesia komunikado, terminologio kaj planlingvoj" (= Wüster-konferenco) kaj

b) la 4-a simpozio de Infoterm "Terminologia laboro kaj scio-transdono. La plej bona praktiko en la terminologio-traktado kaj en terminografio".

La konferencon organizis, krom Infoterm, ankaŭ Internacia Instituto pri Terminologio-Esploro, Internacia Esperanto-Muzeo (direktoro Herbert Mayer) cxe Austria Nacia Biblioteko, la austria UNESKO-Komisiono kaj Internacia Reto por Terminologio (TermNet). Inter la subtenantaj organizajxoj trovigxis i.a. Internacia Organizo por Normigado (ISO), Internacia Federacio de Tradukistoj (FIT), Universala Esperanto-Asocio kaj la germana scienca "Societo pri Interlingvistiko" (GIL), kiun gvidas Detlev Blanke. Inter la membroj de la organiza komitato estis Herbert Mayer. Detlev Blanke apartenis al la programa komitato.

Kvar lingvoj estis oficialaj: la angla, germana, franca kaj Esperanto. Kompreneble regis la angla, iom ludis rolon la germana. La francan kaj Esperanton oni uzis nur por po unu prelego.

En komuna malferma ceremonio, kiu okazis en la pompsalono de la Austria Nacia Biblioteko (kvaza katedralo), 6 prelegantoj (cxuiuj en la angla) prezentis facetojn de la vivo kaj verko de Eugen Wüster. Pri lia biografio prelegis Friedrich Lang kaj Helmut Felber, Erhard Oeser pri la influo de Wüster al la scienco-filozofio, Heribert Picht pri terminologio kaj faka komunikado, Detlev Blanke pri la rilatoj inter terminologio-scienco kaj planlingvoj en la verko de Wüster kaj Gerhard Budin pri la komputiligota Wüster-arkivo (al kiu ankaŭ apartenas la planlingva materialo).

Tiuj prelegoj jam aperis tuj antaŭ la konferenco (la 35-pagxa cxapitro de Blanke kun germana kaj esperanta resumo) kune kun kontribuoj pri la scienca korespondado de Wüster (Wolfgang Nedobity), pri tri nefinitaj projektoj de Wüster - t.e. pri a) la Sistema Difinvortaro de Bazaj Nocioj de la Terminologio-scienco, b) la Internacia Terminologio-sxlosilo kaj c) Fina Projekto-Raporto (do la resumo de lia scienca verko) - (Hildegund Bühler). Sekvas eseo pri la historio de la familio kaj fabriko de Wüster, verkita de la filo, Thiele Wüster, kaj la preskau kompleta bibliografio de la verkoj de la jubileulo (kompilita de Helmut Felber). Pri la libro vidu 1.3.

La bibliografio enhavas la parton "Planlingvoj - Esperanto" kun 128 titoloj (inter tiuj 82 en Esperanto). En tiu bibliografio ankaŭ estas registritaj publicajxoj pri Wüster, kie mankis iuj titoloj (krom Haupenthal 1974) pri Wüster, menciitaj en la literaturlisto sub 1.1. , krome la titoloj Wüster 1978 kaj 1994. La listo jam estas sendita al prof. Felber kaj Infoterm por kompletigo.

La Wüster-konferenco havis jenajn sekciojn:

1. Terminologio-scienco, informado & dokumentado kaj scienca teorio,
2. Terminologio-scienco kaj faklingvoj,
3. Terminologio-scienco kaj planlingvoj,
4. Terminologio-scienco, scio kaj lingvo-planado.

La sekcion 3 preparis kaj prirespondecis D. Blanke. Gxi havis jenajn prelegojn:

- "Problemoj de la organizado de terminologiaj aktivecoj en Esperanto" (Wera Blanke, Berlin),
- "Pri la prezento de latinaj kaj grekaj propraj nomoj en la Enciklopedia Vortaro de Wüster" (prof. Otto Back, Vieno),
- "Eugen Wüster kiel leksikografo: rolo kaj prezento de frazeologio en la Enciklopedia Vortaro Esperanto-Germana" (d-rino Sabine Fiedler, Leipzig),
- "Eblecoj de planlingvo cxe inter-lingvaj nocio-diferencoj - cxe la ekzemplo de fervojaj terminoj" (d-ro Heinz Hoffmann, Radebeul/Dresden),
- "Principoj de la multlingva forstscienca vortaro "Lexicon silvestre" (d-ro Karl-Hermann Simon, Eberswalde/Germanio),
- "Nomoj de plantoj kaj bestoj en Esperanto: la konceptoj de Wüster kompare kun tiuj de aliaj terminologoj" (d-ro Wim de Smet, Kalmthout/Belgio)
- "Pri la planlingva postlasajxo de Eugen Wüster en la Austria Nacia Biblioteko (Herbert Mayer, Vieno).

La prelego de Wim de Smet estis en Esperanto, cxuiuj aliaj en la germana. Anka tiuj prelegoj aperos en la kongresaktoj, cxuiuj kun anglaj kaj esperantaj resumoj (tiu de de Smet kun franca kaj ampleksa angla resumo).

La finan raporton pri la laboro de la sekcio prezentis Sabine Fiedler.

Estis tre gxojige konstati, ke ankau en diversaj prelegoj de neesperantistoj estis menciita la laboro de Wüster por/pri Esperanto kaj la influo de planlingvoj al lia scienca verko. Tion ankau tre bele montris la ekspozicio "La Vortigo de la mondo - la Ordigo de la scio" pri la vivo kaj verko de Wüster, organizita de IEMW kaj Infoterm en la Nacia Biblioteko.

Lige al la konferenco okazis duhora arangxo pri la programo de Europa Unio, la "Multlingva Informsocio", kiu (en la angla) ripete montris la akri gxantan lingvo-problemon kaj rekonfirmis la neceson konservi la multlingvecon de la Unio. El la ne plu ignoreblaj praktikaj kaj politikaj problemoj de la ja subtenata (sed tamen ne sufcixe praktikata) multlingveco oni vidis eliron en la pli forta kaj pli sistema apliko de elektronikaj rimedoj. En tio ludos grandan rolon ankau kunordigata terminologia aktivado.

La konferenco certe ne montris aktivan intereson por la pli forta utiligado de Esperanto kiel faklingvo, sed gxi ja estimis la interlingvistikan kontribuon de Wüster kaj kun intereso konatigxis kun la nuntempa agado en tiu kampo.

Detlev Blanke

### 1.3 La enhavo de la jubilea libro pri Wüster

OESER, Erhard/GALINSKI, Christian (1998,Eld.): Eugen Wüster (1898-1977). Leben und Werk - Ein Österreichischer Pionier der Informationsgesellschaft. His Life and Work - An Austrian Pioneer of the Information Society. Wien:TermNet, ISBN 3-901010-20-3, 324 p.

Christian Galinski/Erhard Oeser:  
Einleitung - 7

Friedrich Lang:  
Eugen Wüster - His Life and Work until 1963 - 13

Friedrich Lang:  
Eugen Wüster - Erinnerungen eines Zeitzeugen - 27

Helmut Felber:  
Weltweite terminologische Tätigkeit zwischen 1965 und 1985 (Wüsters Lebenswerk) - 69

Erhard Oeser:  
Eugen Wüster and his impact on the philosophy of science - 105

Heribert Picht:  
Terminology and Specialized Communication - 117

Detlev Blanke:  
Terminology science and planned languages - 133

Gerhard Budin:  
The Wüster Archive - a special node in a European digital archive network - 169

Wolfgang Nedobity:  
Der wissenschaftliche Briefwechsel Eugen Wüsters - 175

Hildegund Böhler:  
The Scientific Legacy of Eugen Wüster Revisited: Three Major Unfinished Projects - 187

Thiele Wüster  
100 Jahre Wüster & Co Wieselburg 1889-1989 (Auszug) - 207

Helmut Felber:  
Eine erweiterte Wüster-Bibliographie 1931-1977 - 235

Autorenliste/List of Authors - 324

## **1.4 Resumo de la kontribuo de Blanke en la jubilea libro**

*Pri la rolo de planlingvoj en la terminologiscienca verko de Eugen Wüster*

La fondinto de la terminologio-scienca ankau estis grava interlingvistiko kaj kunfondinto de la esperantologio. Lia profunda okupigxo pri planlingvoj konsiderinde influis la evoluon de liaj terminologio-sciencaj konceptoj. La kontribuo skizas la faklingvan rolon de planlingvoj ([artefaritaj] mondhelpingvoj), aparte de Esperanto, kaj la rilatojn inter planlingvoj kaj terminologio-scienca en kelkaj partoj de la verko de Wüster (la Enciklopedio Vortaro Esperanto-Germana, la disertacio Internacia lingvo-normigo en la tekniko, la internacia elektroteknika vortaro kaj la projekto de internacia terminologia kodo).

---

## **2 Gesellschaft für Interlinguistik e.V. (GIL)**

### **2.1 Koncize pri la agado de GIL**

2.1.1 En 1992 12 orientgermanaj interlingvistoj kaj interlingvistike interesitoj vidis la neceson daurigi la interlingvistikan agadon, kiu en GDR estis sufcie sukcesa. Post la unuigxo ja eblus nova dimensio, nome tutgermana. Ili fondis Gesellschaft für Interlinguistik (Societo pri interlingvistiko, GIL). Pri GIL en IpI kp. 1/6.2., 6-7/4.;10-11/2.2.;17/4.;18-19/2.1,3.9;21/6. GIL, havanta intertempe 65 membrojn, legxe registrita kaj rekonata kiel komunutila, cxefe celas kolekti interlingvistike aktivajn koleg(in)ojn, precipe en Germanio (sed ne nur), ebligi al ili la internacian orientation pri la daure aperanta fakliteraturo kaj agadi kiel scienca organizaxo. La statute fiksitaj cxefaj intereso-kampoj de GIL estas:

- popularigi interlingvistikajn sciojn kaj instigi resp. subteni esploradon kaj (universitatan) instruadon cxi-kampe
- subteni nacian kaj internacian kunlaboron de interlingvistoj
- koncentri sian fakan agadon al jenaj cxefaj kampoj:
  - internacia lingva komunikado
  - planlingvistiko
  - esperantologio

Intertempe GIL estas pli kaj pli konata en la lingvistika pejzagxo. Ne cxiu povas farigxi membro de GIL. Oni starigas la peton al la estraro, kiu akceptas au malakceptas. Oni ekz. malakceptis pro nefakaj kialoj la membrigxpetojn de s-roj

Reinhard Haupenthal kaj Ortwin Deubert. GIL tute klare estas esperantista organizo kaj kiel tia malferma al iuj planlingvaj sistemoj kaj vidpunktoj. Tamen, GIL ja konscias, ke Esperanto estas la sole plene lingvigxinta sistemo.

2.1.2 GIL havas jenajn cxefajn regulajn aktivecojn:

- Eldonado de Interlinguistische Informationen (IntI)
- Okazigo de la jarkonferencoj
- Eldonado de Kromkajeroj al IntI
- Eldonado de membro-cirkulero
- Kontaktado kun la lingvistika kaj alifaka scienca medio

## 2.2 Interlinguistische Informationen (IntI)

Gxis nun aperis entute 27 kajeroj kun sume (gxis n-roj 1+2/98) 266 A-5-formataj pagxoj. IntI havas ISSN 1430-2888.

La bulteno klopodas registri la cxefajn interlingvistikajn/esperantologiajn aktivecojn tutmonde, kaj kompreneble aparte tiujn en Germanio. Gxi estas bibliografie orientita sed ankaŭ enhavas raportojn, recenzojn kaj aliajn materialojn. Unufoje dum la jaro gxi prezentas detalan bibliografion pri interlingvistiko/ esperantologio, kiu enkludas ankaŭ gravajn verkojn pri la internacia lingvo-politiko (aparte: europa lingvo-problemo). La bulteno registras nur tiujn materialojn, kiujn la redaktoro ricevis, do ne kopias alies bibliografiojn.

Supozeble novuloj, sed versxajne ankaŭ spertaj interlingvistoj, kiuj ja ne povas sekvi la tutan literaturon, trovos superrigardon pri la eble cxefaj materialoj, kiuj aperadas dum la jaro.

La bulteno ne nur iras al la membroj, sed ankaŭ al diversaj germanaj bibliotekoj, internacie gravaj interlingvistikaj bibliotekoj, al konataj lingvistoj kaj aliaj interesitoj. Gxi jam eniras la kutimajn lingvistikajn bibliografiajn servojn kaj estas tie registrata.

## 2.3 La jarkonferencoj de GIL

Ili okazas lastatute unufoje jare, gxis nun preskau cxiam en Berlin, kaj daŭras de vendredo (vespero) gxis dimanĉo tagmeze, kutime dum novembro. Ilin partoprenas 30-40 personoj. Post la administraj kaj statute preskribitaj traktadoj okazas faka programo kun 10-12 prelegoj, kiuj estas dedixitaj al kadra temo.

La konferencoj kun siaj kadraj temoj gxis nun:

2.3.1 La fonda konferenco, 6.4.1991. Sen kadra programo.

2.3.2 Interlingvistikaj aspektoj de la europa lingvo-politiko, 16.-18.10.92 (Bad Saarow cxe Berlin)

2.3.3 Lingvistiko kaj interlingvistiko, 15.-17.10.93

2.3.4 Esperantologio, 18.-20.11.94

2.3.5 Problemoj de la tradukado kaj interpretado en planlingvoj, 24.-26.11.1995

2.3.6 Terminologi-sciencaj aspektoj de interlingvistiko, 15.-17.11.96

2.3.7 Socikulturaj aspektoj de de planlingvoj, 15.-17.11.97

2.3.8 Interlingvistiko kaj leksikografio, 6.-8.11.98

Kvankam GIL ne fiksas lingvan regulon en sia statuto, la cxefa lingvo estas la germana. Sed tio ne ekskludas la uzon de aliaj lingvoj. Oni jam krome uzis Ido(n) kaj Interlingua(n) (2.3.7: Tazio Carlevaro). Dum la konferencoj regule okazas ekspozicio pri novaj interlingvistikaj eldonaĵoj, krome ekzistas libroservo.

## 2.4. La Kromkajeroj de IntI

La kromkajeroj enhavas la prelegojn de la jarkonferencoj sed foje ankaŭ aliajn materialojn. Ili havas apartan ISSN: 1432-3567.

Gxis nun aperis jenaj kajeroj:

#### 2.4.1 Kromkajero 1:

Becker, Ulrich (Red.,1996): Translation in Plansprachen. Interlinguistische Informationen. Beiheft 1. 70 p., 16 DM (Prelegoj de la 5a jarkonferenco de GIL)

[fotokopio netransskribita]

#### 2.4.2 Kromkajero 2:

Becker, Ulrich (1997, Red.): Terminologiewissenschaftliche Aspekte der Interlinguistik. Interlinguistische Informationen. Beiheft 2. 54 p., 14 DM (Prelegoj de la 6-a jarkonferenco de GIL)

[fotokopio netransskribita]

#### 2.4.3 Kromkajero 3

Becker, Ulrich/ Wollenberg, Fritz (1998, Red.): Eine Sprache für die Wissenschaft. Interlinguistische Informationen. Beiheft 3. 120 p. 28 DM (= Wilhelm Ostwald kaj la internacia lingvo) Pri cxi tiu kajero vidu 2.8 La kromkajero 4 (prelegoj de la 7-a jarkonferenco de GIL) eldonigxos gxis fino de 1998.

### 2.5 Membro-Cirkulero

Gxi eldonigxas laubezone, 2-3foje jare, kaj informas la membrojn de GIL pri arangxoj kaj ties kondicxoj, pri aligxo de novaj membroj, pri kotizoj kaj aliaj administraj aferoj. Gxin ricevas nur la membroj. Gxis autuno de 1998 eldonigxis 17 cirkuleroj. La cirkuleroj ebligas al la estraro, se necese, rapide informi siajn membrojn pri aktualajxoj.

### 2.6 Kontaktado kun lingvistikaj kaj alifakaj medioj

La eldonajxoj estas la cxefa kontaktilo kun la profesia lingvistika medio. Krome ekzistas personaj kontaktoj flanke de la membroj de GIL, de kiuj kelkaj estas aktivaj en la universitata medio. Ili ankaŭ foje partoprenas lingvistikajn konferencojn au prelegas lau invito (ekz. en la faka programo de Expolingua). Ankaŭ okazas, ke GIL kunorganizas fakan konferencon, ekz. tiun pri Wilhelm Ostwald en Humboldt-Universitato. GIL aktive partoprenis la preparon de la jubilea konferenco por Eugen Wüster (kp. 1.2)

Se interesitoj sercxas informojn pri interlingvistikaj publicajxoj au volas kontakti tiufakajn specialistojn, ili trovas informojn en manlibro pri lingvistoj (Kürschner, Wilfried: Linguistenhandbuch. Tbingen 1994, 2 volumoj) au en manlibro pri sciencistoj (Kürschners Deutscher Gelehrtenkalender 1996. Geistes- und Sozialwissenschaften. 17. Ausgabe. Berlin- New York: de Gruyter, al kiu apartenas CD-ROM, kiu ekz. enhavas elektan bibliografion de kelkaj membroj de GIL). Ankaŭ la hejmpagxo de GIL pli kaj pli estas uzata kaj peras kontakton al GIL, ekz. de studentoj, doktorigxontoj au lingvistoj bezonantaj fakajn informojn. La bulteno de GIL "Interlinguistische Informationen" estas regule menciita en grava lingvistika bibliografio (Bibliography of Linguistic Literature, Frankfurt/M: Klostermann). La enhavtabelo de IntL nun ankaŭ estas reproduktita en la monda informservo pri lingvistikaj revuoj CCL. Current Contents Linguistik. Inhaltsverzeichnisse linguistischer Fachzeitschriften (Frankfurt/M: Stadt- und Universitätsbibliothek Frankfurt am Main).

Do, la establita lingvistika medio povas (se volas) trovi kontaktojn al la interlingvistika faka medio.

### 2.7 GIL - cxu instigo por aliaj ?

Mi iom pli detale prezentis GIL, cxar mi opinias, ke estus necese, establi en diversaj naciaj medioj similajn au aliajn neesperantistajn (!) sciencajn societojn au instancojn. Ili povus kolekti la interlingvistike interesitojn, kiuj ofte agadas izolite kaj ne estas suficxe informitaj pri tio, kion faras aliaj interlingvistoj. Tia organizajxo povus kontakti alilandajn similajn partnerojn kaj kunlabori kun ili. Ili povus esti seriozaj kontaktpartneroj por alidisciplinaj sciencaj medioj, kie esperantistaj organizoj (au akademioj au institutoj) ne estus agnoskitaj. Se lau la diversaj kondicxoj sur nacia ebena la interlingvistoj/esperantologoj organizigxus, ili donus pli aktivan bazon por internaciaj aktivecoj, ol tion gxis nun prezentas ekzemple CED. Kiu volus iom pliinformigxi pri GIL, vizitu gxian hejmpagxon en Interreto:

## 2.8 Pri la enhavo de Kromkajero 3 Eine Sprache für die Wissenschaft

[fotokopio netransskribita]

## 2.9 La 7-a jarkonferenco de GIL

La konferenco okazis en la Cxaskastelo Glienicke/Berlin. Partoprenis 37 personoj. La membrokunsido de la Societo konfirmis la malnovan estraron: d-ro Detlev Blanke (prezidanto), prof. d-ro Ronald Ltzsch (vicprezidanto), Ulrich Becker (trezoristo), pliaj membroj de la estraro: d-rino Sabine Fiedler, d-ro Werner Bormann.

La faka programo (en la germana lingvo; kadra temo "Socikulturaj aspektoj de de planlingvoj") havis jenajn prelegojn:

- La plej nova situacio de la movado por la latina lingvo raporto pri la 9-a mondkongreso de latinistoj (Vera Barandovská-Frank)
- Andreas Juste: Ipse-kompreno da moderna Ido-poeto segun lua verkaro (en Ido, Tazio Carlevaro)
- La socikultura memkompreno de la plej gravaj planlingvoj (Tazio Carlevaro)
- Pri la karakterizajxoj de la Esperanta lingvo-komunumo - rezultoj de enketo (Sabine Fiedler)
- La Esperanto-movado en la sociaj fluoj de sia tempo - raporto el propra sperto (Werner Bormann)
- Socikulturaj aspektoj de la greka literatura lingvo (Johannes Irmscher)
- La germana ortografio-reformo kaj gxiaj kritikistoj (Otto Back)
- Introduction in Interlingua (en Interlingua, Tazio Carlevaro)
- La zamenhofsistema de lingvo-planadaj principoj kiel valortaksita konkretigo de la plancelo de Internacia Lingvo (Helmut Welger)
- La formado de verboj el substantivaj radikoj en Esperanto (Klaus-Dieter Dungert)
- Pri la aktuala stato de la Esperanto-bibliotekoj kaj kolektoj en la mondo (Johannes Pachter)

La 8-a jarkonferenco de GIL (6.-8.11.1998) traktos la kadran temon "Interlingvistiko kaj leksikografio".

---

Eldonas: Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) cxe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Red.: Detlev Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, DE-12683 Berlin, tel.: ++ 49-30-54 12 633, fakso: ++ 49-30-54 56 742. [blanke.gil@snafu.de](mailto:blanke.gil@snafu.de) Mendojn oni nur direktu al UEA, kontribuojn nur al la redak-toro. Artikoloj sen indiko de la aŭtoro estas de la redaktoro. Represo kun fontindiko permesata. Estas bibliografiitaj nur posedataj materialoj. Bv. sendi ilin al la redaktoro.

---

[Informilo por Interlingvistoj](#)

[Esperantologio kaj Interlingvistiko](#)

[Centro de Esploro kaj Dokumentado](#)

---

Sendu demandojn au komentojn al [Mark Fettes](#).